*Okazis antaŭ 225 jaroj...*

**_James Cook_ komencas sian lastan mondvojaĝon**

La 12an de julio 1776, la brita marveturanto kaj eltrovinto *James Cook* ekveturis por sia tria kaj lasta mondvojaĝo. Komisie de la Reĝa Geografia Asocio la marnaviganto kaj esploristo de la Suda maro devis trovi trapasadeblecon inter Pacifiko kaj Atlantiko; sed en tio li malsukcesis. Kiel ankaŭ dum sia dua vojaĝo, *Cook* forlasis Anglujon en *Plymouth.* Revenante de Novzelando li trovis dum la marvojaĝo (ĉirkaŭ 200 jaroj post la Hispanoj) la insulon Havajo kaj faris desegnaĵojn de la nordokcidenta marbordo de Ameriko. Flosanta glacio fine devigis lin returniĝi al Havajo, kie li estis murdita de indiĝenoj en la jaro 1779. *Cook,* kiu pasigis sian junaĝon sub mizeraj cirkonstancoj, alpropriğadis al si siajn ampleksajn konojn preskaŭ sen iu ajn lerneja edukado.

*Okazis antaŭ 180 jaroj...*

**_Kneipp_, malkovrinto de la saniga forto de akvo,**

naskiĝis la 17an de majo 1821. Preni mallongajn banojn en la malvarmega akvo de Danubo savis, kiel li mem manifestis, lian vivon: la juna studento pri teologio *Sebastian Kneipp* delonge suferis pro tuberkulozo, kaj la kuracistoj plu ne esperis, ke li resaniĝos. Sed per sia memterapio en la vintro 1849/50, *Kneipp* ekkonis la sanigan forton de la akvo. Ekde tiam, li volis pludoni sian naturan kuracmetodon. "Al saniga korpa kaj spirita disvolviĝo apartenas ĉefe prudenta 'sin-hardado', ĉar korpa malhardiĝo kaŭzas letargion, senfortecon kaj neagemon," li iam diris. En la jaro 1889 aperis lia libro 'Tiel vi vivu!', kiu post komenca kontraŭstaro flanke de la konservativ-klasika medicininstruado triumfe venkprocesiis ĉirkaŭ la tuta mondo. La grava efikeco de *Kneipp* estis la ĝenerala revivigo de antikvaj kuracmetodoj: jam la greka medicinulo Hipokrato priskribis akvan kuracmetodon kiel tre helpeman, preventan kaj saniga rimedon.

*Okazis antaŭ 4 jaroj...*

**Tradukistoj petas pri helpo**

En aprilo 1997, germanaj tradukistoj pete transdonis memorandon al *Roman Herzog,* tiama prezidento de la Federacia Respubliko Germanio, por subteno dum estigo de tradukisto-fonduso. Kun tia fonduso el federaciaj, landaj kaj fondusaj financrimedoj la tradukista laboro povus esti financata kaj plifaciligata, oni aŭdis el la Eŭropa Tradukista Kolegio en la malsuprarejna urbo *Straelen.* La prezidento komentis la signifon de literatura traduko: "Ni havas kaŭzon ekzerci nian kulturan interŝanĝon kun la tuta mondo". Dum interparoladoj la profesiaj tradukistoj atentigis la federacian prezidenton pri la ekonomie ofte malfacila situacio en tiu ĉi profesio. La honorarioj neniam tute sufiĉis por vivteni onin sole per traduklaboro. La tradukistoj kritikis, ke eldonejoj ofte akceptas eĉ malbonajn tradukojn por ŝpari monon aŭ tempon. (Fonto: *dpa* en *Werra-Rundschau* 1997-04-30)



# La komedio "Paco" de Aristofano kiel politika alegorio

*Nina* KORĴENEVSKAJA-GOURIOU

## Enkonduko

Politika alegorio en teatro naskiĝis en antikveco, kiel subĝenro de komedio. En antikva Grekio la tragedio okupiĝis pri dioj kaj reĝoj, la komedio pri ĉiutaga vivo, sociaj kaj politikaj problemoj de sia epoko.

La komedio oficialiĝis en Grekio en la V-a jarcento a.K. Aristotelo difinis ĝin tiamaniere: "La komedio estas imitado de homoj, posedantaj malplialtajn moralajn kvalitojn, ne malvirtaj, sed en la sfero de ridindo, kiu estas parto de malbelo; ĉar ridindaĵo estas malbelo kaj manko sen doloro nek damaĝo; tiel, ekzemple, komika masko estas malbela kaj malformita sen esprimo de doloro".[1]

La unua komediverkisto konata de ni estas Aristofano (ĉ. 445 - ĉ. 386 a.K.). Lia lasta verko datiĝis de 388 a.K. Dek-unu komedioj de Aristofano konserviĝis ĝis nuna tempo, el kiuj la plej konataj estas "Nuboj", "Lizistrata", "Birdoj" kaj "Ranoj".

## "Paco" (421 a.K.)

Aristofano vivis en la tempoj de peleponeza milito. Milita temo aperas multfoje en liaj verkoj. Ĝi estas la ĉefa temo de "Paco": Grekio estas laca de militoj; aparte suferas la kamparanoj, kies kampoj estas tretitaj. Do, atika vitisto Trigeo decidas haltigi la militon: li supreniros ĝis ĉielo por pridemandi Zeŭson pri la sorto de grekoj.

Trigeo vojaĝas sur granda malodoranta skarabo. En la ĉielo li renkontas Hermeson. Hermeso rakontas al li, ke la dioj estas treege malkontentaj kaj lacaj pro la stulteco de la grekoj; ili penas haltigi la militbatalojn, sed la grekoj ĉiam rekomencas. Pro tio la dioj foriris pli alten en la ĉielon kaj lasis la grekojn al la dio Milito.

La diino Paco estas enterigita en profunda puto. Trigeo vokas la ĥoron de grekaj kamparanoj; tiuj malplenigas la puton kaj liberigas Pacon. Kune kun ŝi aperas du aliaj diinoj: Rikolto kaj Festo. La kam-

paranoj revenas al siaj kampoj, Trigeo preparas sian geedziĝon kun Rikolto. Ĉiuj gloriigas Trigeon, kiu savis la landon disde Milito. Ĉiuj ĝojas, krom kelkaj armilproduktistoj. La teatraĵo finiĝas per granda festo.

**La temo de milito kaj paco**

En la teatraĵo la nocioj de milito kaj paco estas personigitaj pere de alegoriaj figuroj: Paco esta ligna statuo, tre granda, tre bela, senparola rolo. Milito estas vera rolo, ludata de aktoro. Ĝi parolas kaj moviĝas. Ĝi aspektas kiel terura batalanto. Kiam Trigeo atingas la ĉielon, li vidas Militon, kiu preparas grandegan kanonon.

Milito (kun malbonaŭgura ridaĉo): "Ha! Ha! Homoj, malfeliĉaj homoj! Kion vi ricevos tuj sur viajn muzelojn, sur viajn makzelojn".

Trigeo (terurita): "Dio mia! Dioj miaj! Kia kanonego! Kaj Milito! Jen ĝi estas do! Jen estas ĝi, kiun ni timas, la Terura, la Armita!"[2]

Trigeo vokas la tutan popolon: "Venu, laborantoj de tero kaj de komerco, de konstruejoj kaj de atelieroj, novvenitoj kaj fremduloj, venu ĉiuj, ĉiuj nacioj, ĉiuj alterne, kun fosiloj, kun kordoj, kun leviloj!"[3]

La aŭtoro nemulte parolas pri kaŭzoj de la milito. Laŭ li, temas pri persona kverelo inter kelkaj famuloj kaj politikistoj.[4] Ni opinias, ke tiu klarigo ne havas sciencan valoron. Sed li tre bone montras du kampojn de grekoj: militdefendantoj kaj pacdefendantoj. Trigeo kaj aliaj kamparanoj volas pacon. Militistaro, armilproduktistoj kaj kelkaj politikistoj volas daŭrigi la militon. Aristofano senmaskigas militdefendantojn, kiuj profitas de milito: "Kio estas profito por tiuj homoj, estas malĝojo por iliaj kamparanoj." [5]

En ĉiuj dramverkoj de Aristofano la ĉefa epizodo estas batalo: (reala batalo pli-malpli skizita, kiu estas tuj antataŭita de parolbatalo, siaspeca oratora konkurso) kontraŭstariganta la ĥoron kaj aktorojn. En la fino de tiu batalo estas realigita fantazia ideo, kiu estas la ĉefa temo de la verko kaj ĝia enhavo." [6]

En "Paco" la ĉefa epizodo estas batalo por Paco, sed en tiu verko batalo estas laboro: la ĥoro gvidata de Hermeso kaj Trigeo malplenigas la puton kie estas enterigita Paco kaj tiras ĝin eksteren. La laboro ne estas facila, komence ili tute ne sukcesas, ĉar ĉiu tiras en sian direkton. Finfine la ĥorestro konstatas: "Estas sabotantoj inter ni!" Oni estas devigataj forpeli ĉiujn, kiu volas daŭrigi la militon. Post tio la laboro progresas. Sed ĝi postulas ankoraŭ multajn penojn kaj streĉojn. Kiam Paco estas liberigita, la teatraĵo ne plu evoluas. Paco revenis - nun plej longa parto de la komedio montras postsekvojn de ĝia reveno kaj reagojn de diversaj popoltavoloj kaj profesioj.



En la komedio ni vidas kvar tipojn de personoj: homoj, dioj, ĥoro kun sia ĥorestro kaj alegoriaj figuroj. Trigeo esprimas la pozicion de kamparanoj, Hermeso estas reprezentanto de dioj, li ege aktive partoprenas en ĉiuj eventoj. La ĥoro personigas ĉiujn grekajn kamparanojn, fakte, ĝi povas esti konsiderata kiel "kolektiva" alegorio. Aliaj alegoriaj figuroj estas malsamaj: Milito kaj Pugnobatalo estas veraj roloj; tiuj figuroj moviĝas kaj parolas, ili eĉ havas skizan karakteron: ili estas malbonaj kaj agresemaj.

Rikolto kaj Festo same moviĝas, sed ne parolas. Finfine, Paco estas ligna statuo, do, evidente, ĝi povas nek moviĝi nek paroli. Sed la aŭtoro trovas eblecon kompensi tiujn mankojn: la statuo moviĝas kun helpo de ĥoro. Por paroligi ĝin, la aŭtoro trovis interesan rimedon: Hermeso proksimiĝas de ĝi, ŝajnigas aŭskulti, kion ĝi diras, kaj laŭte rakontas ĉion al aliaj rolantoj kaj spektantoj. Kial do la diino ne volas paroli rekte al ĉiuj? Ĉar ĝi estas tro malkontenta kaj ofendita pro tio, ke ili permesis enterigi ĝin! Ĉiuj alegoriaj figuroj estas kreitaj pere de personiĝo: abstraktaj ideoj ricevis homan korpon kaj homan aspekton. Krome la aŭtoro uzis ironion kaj groteskon por krei ilin.

Aristofano verkas komediojn. Tio signifas, ke eĉ la plej seriozaj kaj tragediaj temoj estas pritraktataj kun humuro. Li ne montras tragediojn kaŭzantajn de milito, morton, suferojn. Eĉ montrante Militon, li restas ironiplena: Milito intencas detrui ĉiujn grekajn urbojn, sed ĝi prepariĝas bombardi ilin pere de - - lokaj nutraĵoj: Lakonio estos bombita per cepo, Megaro per ajlo, Sicilio per siciliaj fromaĝoj... Ironio ofte estas difinita kiel neatendita renversiĝo. Ĝuste tio estas Milito, kiu bombardas la homaron pere de regionaj produktaĵoj!

La komedioj de Aristofano ne estas "realismaj", ili estas fantaziaj: en "Paco" homo flugas en ĉielon sur giganta insekto. La rolantoj mencias eĉ kondiĉojn de spektaklo: Trigeo, sidante sur mekanika skarabo, petas la teknikiston movigi ĝin singarde, ĉar li timas fali.

Ĝenerale antikva komedio tute ne zorgis pri la iluzio de reala vivo: ĝi estis ludo kaj ne intencis kaŝi tion. Tiu verko estas inter la unuaj politikaj alegorioj en teatro. Ĝi estas ankoraŭ tute ligita al la tradicio de popola festo: rolantoj senĉese adresiĝas al la publiko kiu iĝas partoprenanto de spektaklo; temo kaj intrigo ne estas bone prilaboritaj; intrigo haltas meze de la komedio. Ĉio estas konvencia: figuroj, enhavo, agoj. Samtempe la verko enhavas jam multajn trajtojn de politika alegorio kiel ĝenro. **De politika flanko:** politika enhavo - paco kaj milito; aktualeco de problemoj; klara pozicio de poeto - li estas pacdefendanto kaj arde atakas adeptojn de milito kaj ilian idean ĉefon, politikiston Kleonon; li defendas kamparanojn, kies kampoj estis bruligitaj, ruinigitaj; li alvokas ĉiujn grekojn forgesi siajn kverelojn kaj kuniĝi en porpaca batalo. Li kondamnas la militon kaj glorigas la pacon. **De alegoria flanko:** supozata kaŝita senco: post anekdoto videblas pacbatalo; la alvoko de poeto: haltigi la militon; la enhavo estas fantazia; pluraj figuroj estas kreitaj pere de personiĝo kune kun ironio; la ĥoro reprezentas "kolektivan" figuron de grekaj kamparanoj; ironio aperas en multaj formoj: humuro, grotesko, parodio kaj kaŭzas neatenditan renversiĝon. Pro ĉio tio ni povas konsideri Aristofanon kiel patron de nuntempa politika alegorio en eŭropa teatro.

**Notoj:**

1. *Aristote* (1985). *Poétique* (Aristotelo: Poezia arto). *Paris, Les Belles Lettres,* p. 35
2. *Aristophane* (1987). *Théatre complet* (Aristofano: Plena Teatro). *Paris, Gallimard, t.* 1, p. 439
3. *Ibidem.*, p. 443
4. *Ibidem.*, pp. 461-462
5. *Ibidem.*, p. 462
6. *Robert F.* (1971). *La littérature grecque* (Greka literaturo). *Presses Universitaires de France, Paris.* p. 54

**Adreso de la aŭtorino**
*Dr. Nina Korĵenevskaja-Gouriou*
*Bat. C., L'Espiguette, rue de Verdun*
*FR - 13140 - Miramas*
FRANCIO

**Priaŭtora informo**

D-rino *Korĵenevskaja-Gouriou* estas lektorino por la rusa lingvo ĉe Provenca Universitato, Francio.



# Loĝi energiŝpare

## Pri basenergetikaj kaj pasivaj domoj

*Jan Werner*

**Resumo**

"Loĝi energiŝpare" ne estas devizo de homoj, kiuj prezentas al sia ĉirkaŭaĵo rezultojn de esplorista penado farata pro sia propra profesia plezuro, sed instigo motivita per proksimiĝanta klimata kolapso, kiu en si portas eblan danĝeron por plua evoluo de homa populacio sur nia planedo Tero. Kerno de la problemo enestas la fakton, ke la civilizita teĥnika mondo konsumas pli ol la naturo kapablas al ni liveradi longtempe, krome poluas aeron, akvojn kaj grundon tiom, ke natura regenero ne estas plene ebla. La plej elstara faktoro de poluo estas bruligado de fosiliaj energifontoj.

**Enkonduko**

Pasivaj domoj estas konstruaĵoj termike perfekte protektataj, ili jam ne bezonas hejtsistemon. Alta komforto vintre kaj ankaŭ somere estas atingata sen aŭtonoma hejta kaj klimatiza ekipaĵoj. Pasivaj domoj mem vintre "hejtas" kaj somere ili mem sin malvarmigas pure "pasive" (*Adamson* 1987; *Feist* 1988).

Kriterioj por konstruado de pasivaj domoj:

° Konforme kun **Instrukcio por energetike konscia planado de konstruaĵoj** pasiva domo ne transpaŝu specifan bezonon de primara energio por hejtado sume 15 kWh/m² de utila plankareo jare.

° Suma karakteriza konsumo de primara energio por ĉiuj agadoj en hejmo-mastrumado (rezidua hejtado, varmigo de utila akvo, aerumado, lumigado, kuirado, hejmaparatoj) ne superu 120 kWh/m² de utila areo jare.

Jam relative longe en fakula kaj ankaŭ laika medioj oni parolas kaj skribas pri basenergetikaj domoj, sed la nomo "pasiva domo" estas